



# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »  
5, Quai Vauban - 66-PERPIGNAN (P.-O.) - Telefono 34-38-84

Jara Abono : 3 F. - C. C. P. 956-28 Montpellier

N<sup>o</sup>s 38 - 39

.....0000000000.....2<sup>a</sup>-3<sup>a</sup> Kvaronjaroj  
1971

## 28<sup>a</sup> de MARTO : LA REGIONA KONGRESO de NIMESO

Tiun ĉi jaron okazis en Nîmeso nia regiona federacia kongreso unuigante la respondeculoj el diversajn grupojn de Langvedoko - Rusiljono.-La moderna palaco de Kulturo kaj Sporto gastigis nin dum la kongresa labortago, kiu Doktoro ALBAULT, aktuala prezidanto de UFE honorigis.-

Gesinjoroj VOLPELIERE bonvenigis la tutan ĉeestantaron, ĉar, nur dank'al lia klopodo dependis la sukceso de la kongreso, kvankam kelkajn aliajn tieajn grupanojn iomete prizorgis.-

Je la 10<sup>a</sup> h., Sinjor<sup>o</sup> LLECH-WALTER, Prezidanto de la Regiona Federacio, oficiale malfermis la laborojn, sed dum la tutan tempon, li akompanis kaj prezentis ĉiuj debatoj de niaj problemoj de lingvo kaj organizaĵo.-

Inter la aliaj, la inspektoro CACHON, nur uzante la zamenhofa lingvo paroladis pri kultura valoro de Esperanto, gratulante la nacia iniciativo, ĉar jam oni ekkomencis instrui nia lingvo en lernejoj aŭ Fakultadoj de Aix en Provence kaj Clermont-Ferrand.-

Eĉ la urbestro de la urbo dum sia rapida vizito, mallonge substrekis la fundamenton de la celo de interkompreniĝo inter la homaro, nura bazo de amikeco kaj paco en la mondo.-Pli poste, sekvis alt-nivela parolado de Doktoro ALBAULT, rilate la grava danĝero de poluado en la atmosfero el fulgo kaj radiaj el eksperimentoj de atombomboj, finante, li postulis kontrolon laŭ internacia organizaĵo kiel nura kaj efika rimedo.-

Poste la tagmanĝo komuna ĉe Liceo "Camargue", oni prezentis filmon sur Egiptujo, krom oni vidis interesan ekspozicion de esperantaj libroj ĉe la halo de kongresejo.-En Nîmes eĉ kvar librovendejoj prezentis librojn E en iliaj elmontraĵoj vitroŝrankoj.-

Koncerne organizon ni plendas nur iomete la mankon de signaloj en la urbo kaj kongresejo, sed nia nimesa grupo senkulpiĝas sin, ĉar suferas iomete da apatio.-

Tamen ni rimarkis konstantan progreson, ĉar preskaŭ dum la tutan tagon, oni ne aŭdis krokodili.-

- La Direktoro -  
R . F .



FINANCA RAPORTO de S-ro DELIGNE



Pro diversaj kialoj, mi ne povis konigi al ĉiuj, nian financon situacion, okaze de la lasta Kongreso en Nîmes.

Ci-sube, nia bilanco, starigita la 21-an de Marto 1971, memorigante ke mi akceptis la kasistan postenon la 23-an de Junio 1970.

La bilanco konsistas el tri ĉapitroj :

- 1°) Kaso
- 2°) Sparkaslibreto
- 3°) Poŝtakonto

1°) KASO : a) Aktivo : 250,00 F-oj (kotizoj por U.E.F.; U.E.A. k. Sud Franca Stelo )

b) Pasivo : 221,00 F-oj

HAVAJO : 29,00 F-oj

2°) Sparkaslibreto : a) Aktivo : 221,14 F-oj  
b) Pasivo : Nulo

3°) POSTKONTO : a) Aktivo : 2.346,33 F-oj  
b) Pasivo : 2.082,01 F-oj

HAVAJO : 264,32 F-oj

Resume, la tuta havaĵo konsistas el

Kaso..... 29,00 F-oj

Sparkaslibreto 221,14 F-oj

Poŝtkonto... 264,32 F-oj

Sumo..... 514,46 F-oj

Mi intencis fari multajn rimarkojn pri nia financa funkciado, kiujn mi ne povis fari pro manko da tempo. - Mi faras ilin dum la kunveno de la federaciaj respondeculoj, kiu devus okazi en Oktobro.

P. DELIGNE

P.S. El tiu raporto kiun ni mallongigis, ni ankaŭ mencias la nombron de kotizoj : 70 por U.E.F. - 16 por U.E.A. kaj 133 por S.F.S., tio riprezentanta 2.008 F-oj .-

---:---:---:---:---:---:---:---

RAPORTO PRI LA DEKANA PASKA KULTURA SEMAJNO

kiu okazis en GRESILLON, de la 3a ĝis la 9a de APRILIO 1971

Dum la lasta Nacia Kongreso de Henako, mi akceptis organizi, en 1971, la dekan Paskan Kulturajn Semajnoj. - Mi akceptis ĉar mi pensis ke estus taŭge inviti kalkajn studentojn el la Fakultatoj de Clermont-Ferrand kaj Aix en Provence kiuj sekvis la oficialajn esperantajn kursojn de Profesoro JANTON kaj DUC-GONINAZ. -

Dum la Universala Kongreso de VIENO, mi jam kontaktis P-ron JANTON por ke li venu al Grésillon... Mi bone agis, ĉar, ĉiujare, por Pasko, li vojaĝas al Britujo. - Vi scias ke li estas agregaciulo pri angla lingvo kaj doktoro pri beletroj, kaj, tiun jaron, li decidis - post miaj klopodoj - veni al Grésillon por tri tagoj, prelegi, paroli por la radio kaj televido, kaj respondi al intervjuoj de la ĵurnalistoj.

20 stipendiuloj de U.E.F. inter kiuj 8 gestudentoj de la Fakultatoj de Aix en Provence kaj Clermont-Ferrand ; 20 gelernantoj de liceoj kaj kolegioj kiuj venis proprakoste aŭ je la kosto de grupoj aŭ

. . . . / . . . .



federacioj ; 30 plenkreskuloj partoprenis tiun semajnon. Japanino, anglo, dano kaj du germanoj ĉeestis ankaŭ la staĝon.-

S-ro TURIN zorgis pri la unua grada kurso kaj S-ro RIBOT pri la dua kaj tria gradoj.

La kursoj okazis dum du horoj ĵ k. duono, matene; kaj unu horo k. duono, vespere.-

La 5-an vesperan, P-ro JANTON faris prelegon pri "Esperanto kaj la angla lingvo" dum kiu li substrekis la fiaskon de la lernado de la fremdaj lingvoj (post 7 jaroj da studado la lernantoj scias preskaŭ nenion) kaj li reliefis ke nur esperanto povas solvi la problemon de la interkompreniĝo. Ankaŭ li diris ke la junularo bezonas idealon kaj esperantismo alportas al ili, kun la interna ideo, tiun idealon.

S-ro ROUSSEAU projekciis diapozitivojn pri la U.K. de Vieno, kun komentarioj; F-ino Muriel BÉNAZET faris same pri la U.K. de Helsinko; S-ro TURIN projekciis filmon pri Helsinko kun speciala komentario registrata sur la filmo-mem; S-ri THIERRY faris interesajn prelegojn pri "ĝia vorta moŝto" kaj "ĉu drameca la lingvo internacia?" Li klarigis ankaŭ la strukturon de la esperanto-movado kaj prezentis librojn verkitaĵojn ĉu originale, ĉu tradukite. Precipe la ampleksa "Dia Komedio" impresis la studentojn.

Okazis ankaŭ, kun la partopreno de P-ro JANTON kaj de ĉiuj gvidantoj, debatoj pri antaŭjuĝoj koncerne Esperanto. Tiuj debatoj estis vere interesaj kaj la junuloj partoprenis aktive la diskutadon.

Ekskurso al kastelo de Angers, sub la gvidado de S-ino CHEVERRY, kun la vizito de la femkonata tapetaro "Apokalipto" (13-a jarcento) en la fortika mezepoka kastelo, tuj poste de la moderna riĉkolora verko de Jean Lurçat "La kanto de l'Mondo"; promenadoj en Vieil-Baugé, ĉe Dolmeno; kaj la simpla restado en la belaj ĉirkaŭaĵoj de la kastelo estis la distra flanko de tiu 10-a P.K.S.

Mi devas forte danki ĉiujn kiuj sendis monon por la fonduso de la semajno; ĉiuj ricevos finanĉan raporton kaj ili povos konstati ke ni bone uzis la donacojn kaj eĉ ŝparis iom por la venonta jaro...

Sed ankaŭ mi devas speciale danki ĉiujn kiuj helpis al mi: unue Ge-roj BABIN, ĉiam afablaj kaj sindonemaj, kiuj faris multe por la sukceso de nia lingvo; ankaŭ Ge-roj BODEROT kiuj deĵoris ĉe la kastelo dum la staĝo; kaj eĉ S-ino MICARD kiu ne hezitis repreni la antaŭtuton por helpi ĉe la kuirado kaj ĉe la manĝoĉambro.-Kompreneble, mi devas danki S-ron RIBOT kiu gvidis la duan gradan kurson, S-ron TURIN kiu gvidis la unuan gradan kaj la prelegantojn: P-ro JANTON, S-roj ROUSSEAU kaj THIERRY, F-ino BÉNAZET (la filino de niaj geamikoj el Argelès-sur-Mer), kaj mi ne forgesu S-inon CHEVERRY kiu ne nur zorgis pri la ekskurso, sed ankaŭ kontaktis radion, televidon kaj gazetojn.-

Ni havis, dum la staĝo, la viziton de la urbestro de Baugé, S-ro SIRODEAU, kiu estas samtempe Vic-Prezidanto de la departementa konsilantaro de "Maine-et-Loire".-

Por resumi, gravan sukceson ricevis la 10-a Paska Kultura Semajno ne nur pro la kvanto de la partoprenantoj, sed ankaŭ pro la kvalito, kaj tio estas, por ni ĉiuj, kuragiĝo.-

René LLECH-WALTER

ANONCETO :

Varbus ge-servistojn dum la ferioj: edzo, kiel aŭtomobila kondukisto, edzino, kiel kuiristino.-Ili devos, nepre, korekte paroli latine, kaj ĉefe koni la teknikan vortaron latinigatan.-Sin turni al S-ro Paul GUTH, "El mia lukarno" -Midi-Libre (kiu transdonos).-

H.J.



RAPORTO de BRITO pri la DEKA KULTURSEMAJNO ĉe GRESILLON

Pri la loko : Neniam en mia tuta vivo mi vidis tian pitoreskan kastelon. - Sed logi tie estis kiel revo... La mangojn mi trovis iom strangaj - kompare kun la anglaj - sed bongustaj. - Estis kurioze por mi vidi francon trempi sian panon en la kafotasegon dum la matenmanĝo. -

Pri la homoj : Mi renkontis tiom da afablaj, helpemaj kaj gastemaj homoj... La internaciecon de la semajno certigis la ĉeesto de aliaj nefrancoj. Sajnas al mi ke la granda nombro da francaj studentoj en Grésillon ja estas bona indiko pri la estonteco de la internacia lingvo en Francujo. -

Pri la prelegoj kaj paroladoj : Ili estis tre altnivelaj kaj mi lernis multon. - Kiel bonsanca mi estis sekvante kursojn de P-ro RIBOT. -

Pri la paŭzotempoj : Ne mankis la okazoj promeni en la bela parko, ludi tablotenison, kaj babili en la kafejoj de Baugé. -

Miajn korajn dankojn al ĉiuj organizantoj kaj gvidantoj de la kultursemajno, kaj precipe al U.E.F. kiu bonvolis inviti stipendiulon al Britujo. -

Hilary CHAPMAN  
(Bangor, Britujo)

-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-

RAPORTO pri la NACIA KONGRESO de ESPERANTO

La 63-a Nacia Kongreso de Esperanto okazis, dum Pasko, en Liono, ĉe la Komerca Palaco. - La respondeculoj de la kulturaj centroj de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" ĉeestis aŭ delegis siajn povojn. -

S-ro René LLECH-WALTER raportis pri la 10-a Paska Kultura Semajno kiu okazis la antaŭajn tagojn en Grésillon. - 70 staganoj partoprenis tiun seminarion inter kiuj studentoj de la beletraj fakultatoj de Aix en Provence kaj Clermont-Ferrand. -

S-ino VOLPELIERE estis unuanime elektita membro de U.F.E. Niaj varmajn gratulojn...

D-ino Yvette VIERNE prezentis trafajn afiŝojn pri "Esperanto-Akcepto" kiujn oni devus surmeti ĉe la stacidomo kaj ĉe la turisma oficejo de ĉiu urbo kie loĝas samideanoj. - Por la mendo sinturni al D-ino Yvette VIERNE, 5, rue Docteur Roux - 34 - Montpellier. -

La libro-servo de la kongreso ekspoziciis multajn verkojn ĉu originalaj, ĉu tradukitaj. - Inter la novaj libroj, oni devas mencii :

- "Vortareto Esperanto" kiu enhavas leksikan kaj gramatikan epitomon kaj esperanto-vortojn grupigitaj laŭ la senso. - Tiun libron verkis P-ro DUC-GONINAZ el la Beletra Fakultato de Aix en Provence, kaj eldonis "OPHRYS" en Gap. - Oni povas aĉeti ĝin en ĉiuj librovendejoj.

- "Paroli Esperanton", studlibro ĵus verkita de S-ino VOLPELIERE, laŭ la asimilmétodo. - Tiun lastan oni povas mendi al S-ino VOLPELIERE, 10, rue de la Servie - 30 - NIMES. -

M.V.

VIVO

de la FEDERACIAJ GRUPOJ

-o-o-o-o-o-o-

Nur alvenis raporto el Perpinjano, Narbono, Aleso kaj Nimeso...

. . . . / . . . .



Ĵaŭdon, 25-an de februaro, je la 3-a posttagmeze, la rusiljonaj esperantistoj kunvenis ĉe la departementa sidejo de la Franca Blinda Amikaro (kie kelkaj lernantoj blindaj kaj vidantaj sekvas, ĉiun semajnon, esperanto-kurson) por aŭskulti la simpatiajn mesaĝojn kiujn ricevis la Kultura Esperanto-Centro de Perpignan okaze de la Internacia Semajno de Amikeco.-

Fino Odette RIBEILL, Prezidantino de la Blinduloj de "Pyrénées-Orientales" bonvenigis - en la lingvo de Zamenof - la esperantistojn kaj dankis ilin pro la elekto de la blinda kunvenejo por la festo de Amikeco.-

Poste, S-ro René LLECH-WALTER, Prezidanto de la esperantistoj de la regiono "Langvedoko-Rusiljono" legis la poŝtkartojn kaj la leterojn senditaj el 14 landoj inter kiuj : Aŭstrujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Sovet-Unio, k. t. p.

La mesaĝoj ĉirkaŭiris en la manoj de la partoprenantoj kiuj povis admiri la belajn pejzaĝojn kaj poŝtmarkojn por la plej granda gojo de la filatelistoj.-

Inter la ĝeestantoj troviĝis - krom la lernantoj de la diversaj kursoj kaj la estraranoj de la blinduloj - S-ro Abécassis, advokato, Pastro Antonio, Ge-roj Bénazet, S-ro Quer, k. t. p.

Dum la honora vino kiu fermis tiun simpatian kunvenon, oni proponis toston je amikeco kaj interkompreniĝo de la popoloj.-

R. LL-W .

--o-o-o-o-o-/-o-o-o-o-o-/-o-o-o-o-/-o-ooooo----

EL NARBONO

-----

Antaŭ longe, la Narbona Grupo anoncis sian intencan organizi Federacian kampanon eliron, je la fino de la monato Majo.-

Mi petas pardonon al ĉiuj, sed pro diversaj kialoj, sano kaj familiaj aferoj, la organizontoj ne povis prizorgi la aferon.

Ni esperas ke la venontan jaron, ni estos pli bonŝancaj kaj povos ĝin organizi.

Kun niaj bedaŭroj, amike via ,

DELIGNE

LA KULTURA ESPERANTISTA CENTRO el NARBONO FUNEBRAS...

-----

La Kultura Esperantista Centro el Narbono ĵus perdis unu el siaj plej malnovaj membroj kaj amikoj .

Sinjoro Bertrand CONSTANS forlasis nin dimanĉon 21-an de Februaro vespere, pro kora krizo.- Samtempe ol sindomema amiko, li estis ankaŭ fervora esperantisto de ĉiam.- Li praktikis la lingvon kun majstreco kaj instruis ĝin kun sukceso.

Li lasas inter ni grandegan malplenan kaj profundajn bedaŭrojn.

Al lia edzino kaj familio ni kondolencas plej sincere .-

DEL.

--o-o--o-o-o-o--e-o-o-o--o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

FEDERACIO " G A R D " -- KOTIZOJ

Ni ĵus eksciis ke la Ĝenerala Konsilantaro asignis al ni modestan subvencian por 1971 .-

Ju pli multnombraj ni estos des pli multe ni povos postuli.... Pro tio ni atentigas niajn samideanojn - kiuj ne ankoraŭ tion faris - ke ili bonvolu pagi 5 frankojn al "Fédération Departementale du Gard pour l'ESPERANTO " C.C.P. Montpellier - 185 - 707

Dankon ...



FEDERACIO " GARD " : EKSURSO en BAGNOLS -sur- CEZE

Ĉirkaŭ tridek gesamideanoj el Avignon, Aix en Provence, Châteaurenard, St Laurent la Vernède, St Nazaire les Bagnols, Nîmes kaj Alès sekvis nian inviton.


Je la 10-a, ni kunigis ĉe la Kultur'kaj Sport-Centro de Escanoux kie estis jam starigita nia ekspozicio.

Certe, ne multe da vizitantoj, tiu-ĉi allogis, malgraŭ niaj propagandaj klopodoj per gazet-artikoloj kaj afiŝoj ĉe montrofenestroj de komercistoj. -Cu ni devas miri pri tio ? Deko da gejunuloj tamen ŝajnis montri intereson al Esperanto.

Ni piknikis ĉe la ombro de la belaj pinoj de Monto "Cotton", kaj posttagmeze vizitis la urbon kaj la muzeon pri modernaj art-pentraĵoj.

Mallonge : agrabla tago kiu plie ebligis al regionaj gesamideanoj pli bone interkonatigi kaj babili .-

René RLYNLAUD



MONTPELLIER : FERIA TASKO de "BONA" ESPERANTISTO

Kion povas fari fervora esperantisto dum sia ferio por helpi la disvastigon de Esperanto ?

Kial mi parolos prefere pri tio ? Ĉar somero alvenas kaj, baldaŭ, ni ferios... Due, kiam ni ferias, ni estas pli liberaj ol dum la laborperiodo. -La tempo malpli urĝas al ni ĉiuj. -Trie, ni ne estas en la kutima loko. -Do, se laŭ ni, en nia kutima vivo, jam elĉerpigis ĉiuj eblecoj, jen novaj... Kvare, apartaj okazoj prezentigas al ni. -

Kompreneble, ni ne parolu pri esperanto al ĉiuj personoj kiujn ni renkontos... Sed ni kaptu ĉiujn favorajn okazojn por uzi ĝin. -

Se ni vojaĝus eksterlanden :

1-e) Ni devas, post aŭ eĉ la franca lingvo, provi uzi esperanton, klare prononcante "esperant<sup>o</sup>". Ekzemple, se mi bezonus informojn elparolante la eksterlandanon "Cu vi parolas en esperanto" ?

2-e) Ni povas viziti la turismajn oficejojn. Kompreneble, ni trovas turismajn prospektojn, pli ofte franclingve ol esperante. -Se ne ekzistus franclingvaĵojn, ni petu esperantaĵojn, aŭ inverse. -

3-e) Se ni konus nur kelkajn anglajn vortojn, ne utilas uzi ilin kiam ili ne estas nepre necesaj. -Ekzemple, por mendi kafon, "kafo" aŭ "café" sufiĉas; ne bezonas "koffe". -Car tiuj kelkaj anglaj vortoj donas la impreson ke la angla lingvo estas universale konata, do ke ĝi estas la internacia...

Se ni vojaĝus tra Francio, ni ankaŭ povas viziti turismajn oficejojn kaj peti turismajn prospektojn en esperanto por nia(j) amiko(j) dana, ĉeĥa, pola, nederlanda, k.t.p. kiu dezirus prepari sian vojaĝon tra nia regiono. -Elektante la naciecon, ni pensu pri lando, kies lingvo ne estas uzata eksterlande (Do ne pri angloj, germanoj, hispanoj, italoj, usonanoj...)

Se ni restus en nia urbo, sed akceptus eksterlandanon,

1-e) Ni povas proponi al li ke li vizitu la tiean turisman oficejon aŭ policejon por demandi kie estas la sidejo de la esperanta klubo

2-e) Se tio ne estus farita, deponi la adresojn de tiu klubo aŭ de iu dumsomera peranto. -

Tiel oni aŭdos pri esperanto kaj scios ke ĝi estas uzata kaj utila ....

Por ĉiuj kaj dum la tuta jaro : ni surmetu nian insignon kaj gluu verdan stelon sur vian aŭtomobilon. -Tiaŭgus ke la vorto "esperanto" aperu ankaŭ. -

BONA FERIO.....

D-rino Y. VIERNÉ



Esperanta kultura Rondo en NIMES

Post la organizado de la Federacia Kongreso, niaj grupanoj kunveniĝis dufoje. Dum la lasta, en la Urba Biblioteko, ni aŭdis niajn gesamideanojn VOLPELIÈRE recenzi pri la Nacia Kongreso en Liono .-

Sed la interesa flanko estis la fluegan raporton el F-ino Marjolaine SCHIUMPF pri ŝia restado en la Kastelo de Grésillon. Dank'al ĝi, oni komprenas pli bone la necescon partoprenigi niajn junajn gelnantojn al tiuj paskaj aŭ someraj staĝoj. -

Kelkaj amikoj ĉeestis la kunvenon en BAGNOLS aranĝita de nia departementa Prezidanto, René RAYNAUD. -

La estonta kunveno okazos kiam nia grupo akceptos polan peregrinanton. -

Ni esperas ke multaj kamaradoj partoprenos la internaciajn kongresojn en Parizo kaj Londono, la recenzoj pri tiuj tutmondaj kunvenaroj estante, por ĉiu el ni, riĉigantaĵo .-

H. J.

P.S. Nia kamarado Roberto FRUS kiu estas help-presisto en nia urbo sukcesis interesi sian estro pri diversaj presaĵoj kiel kalendaretoj menciante la adreson de la lokaj grupoj aŭ perantoj- tiu materiaĵo estas ankaŭ tre utila por interŝanĝi kun alilanduloj). - Li povas ankaŭ presi fortkartajn panelojn kun la vortoj "ESPERANTO" grandlitere kaj la utilaj adresoj ( ili estas praktikaj por turismaj oficejoj, librovendistoj, k.t.p.)  
Postulu kondiĉojn... (Cercle Culturel Esperantiste, 12 Rue de la Servie , 30 - NIMES). -

RED.

Ronéotypé par la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon

Directeur de la Publication : FRUS Roberto N° 996 -Bât.

2.M - ZUP de NIMES .-

Dépôt légal : 2ème trimestre 1971



Ne forgesu praktiki ESPERANTO dum vian libertempon.  
Se vi estos laboremaj, ni akceptas la artikoloj je la fino de septembra monato, do, « BONAN LIBERTEMPON » kaj ni revenos denove al vi en oktobro.





## ***Konatigu !***

Al viaj, fremdaj Samideanoj, la someraj  
spektakloj de folkloro kaj tradicioj, el nia regiono.

**Langvedoko - Rusijlono - Kamargo - Provenco**